Esperantista Vegetarano 1999

Esperantista Vegetarano
1999

Organo de TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO (TEVA)
Movado fondita en 1908 - Unua Honora Prezidando L. N. Tolstoj
Membro de IVU/EVU kaj kunlaboranta kun UEA

Enhavo

- Karaj gesamideanoj 1
- La Esenoj 3
- Travivaĵo el Bulgario:
  Kiel kaprido direktis nin al sensanga nutrado 7
- Bongustaĵoj 9

- Ĉefo *Seattle*:
  Kio estas la homo sen bestoj? 15
- Moroj en perspektivo:
  La revolucio de la pardono en la nuntempa socio 16
- Lingva angulo:
  Ĉu vi havas dubon? 18
- Restoracioj en Svislando 26
- Alianco Universala: *Kalamata,* Grekio 31
- La kalendaro kaj la jaro 2000 32
- Niaj Familiaj Aferoj 34
- Bestoj en Infero 36
- Bestoj en Paradizo 37
- Ni dankas 38
- Kotizoj 39
- Asociaj Informoj 40

Redaktoroj: William Simcock, Ejnar Hjorth, Mark Steinberg, Lilia Fabretto.
Adreso: TEVA - C.P. 5050 - IT - 00153 Roma, Italia.

karaj gesamideanoj,

de la 18-a ĝis la 23-a de Julio 1999 la TEVA-anoj renkontiĝas kaj kunvenas en Widnau, Svislando, kadre de la 7-a Eŭropa Vegetarana Kongreso. Widnau estas bela urbeto en natura, malstreĉa etoso, kaj la kongresa programo estas riĉa je tre interesaj temoj pri sano, vegetarana vivmaniero kaj best-protektado.

Novaj burĝonoj el bonaj semoj estas ekflorantaj en diversaj landoj, malgraŭ tio ke malpacaj fortaj ventoj penas fortranĉi ilin kaj ĉiujn pacajn agadojn en la mondo. Sed ni semas, ni semas konstante, ĉar ni kredas ke la ordono "mortigu" ne trovas pravecon en la homa agado.

La homo de la tria jarmilo estas la "*Homo Frater*" (Homo-Frato). La Homo-Frato, sen armiloj en siaj manoj sed per la forto de la vero, postulas siajn rajtojn, kaj li montras al ni la sensencaĵon batali armitaj unu kontraŭ la alia kaj mortigi por superregi.

La Homo-Frato estas frato al homo kaj al la Naturo. Ni ĉiuj estas filoj de la Patrino-Tero, kaj ni ĉiuj bezonas unu la alian, ne por superregi egoisme sed por respekti unu la alian: eble en tiu ĉi frata rilato troviĝas la solvo al multaj surteraj problemoj.

ĉiam antaŭen!

LA ESENOJ

La skrib-rulaĵoj de Kumrano, biblioteko en la dezerto

TIBERIADA LAGO
JORDANO
TEL-AVIVO
JERUSALEMO
KUMRANO
MORTA MARO

Parolmulton oni faris, kiam neatendita malkovro okazis en la jaro 1947 en dezerta, sabla, roka Kumrano (*Qumran*), ĉe la Morta Maro.

Juna beduena paŝtisto, serĉante kapron el sia grego, kiu perdiĝis, suprenirante rokojn, vidis strangan truon faritan en la fronto de krutaĵo. Li prenis ŝtonon, kaj li ĵetis ĝin enen, sed anstataŭ aŭdi obtuzan baton kontraŭ natura loko aŭ solida roko, li aŭdis metalan sonon de argilaĵo. Pliajn ŝtonojn li enĵetis enen, kaj li ricevis la saman sonon, kvazaŭ ke ŝtonoj frapas ion, kaj falas inter potrompaĵoj.

La junulo miregis. Li decidis grimpi ĝis la truo, kaj tra ĝi li penis ekvidi en la internon de la loko sur la planko, ujojn kun rompitaj pecoj disŝutitaj apude. Tio vekis ĉe li fortan scivolecon. La sekvan tagon li reiris al la loko kun amiko, kaj ili eniris tra la malgranda truo en la groton. Je sia granda surprizo ili ekvidis plurajn larĝkolajn cilindrajn vazojn kun kovriloj, starantajn vice. Forpreninte la kovrilojn, ili malkovris en la vazoj pergamenajn skrib-rulaĵojn volvitajn en feloj kaj teksaĵoj. Sendube oni kaŝis la rulaĵojn tie, sed kiu, kial, kaj kion enhavis tiuj skribaĵoj? El tiu momento, kaj el tiu groto, komenciĝas la historio de la skrib-rulaĵoj de Kumrano: de tiuj antikvaj dokumentoj deponitaj al la silento, kiuj restis kaŝitaj dum 2000 jaroj; de tiu biblioteko en la dezerto, kiu estas redonanta al la mondo per siaj skrib-rulaĵoj, netuŝitajn historiajn kaj religiajn tekstojn;

de tiuj tekstoj, kaŝitaj tie de la Esenoj, kiuj subite kaj neatendite komencis paroli, kiel antikvaj profetoj.

La Esenoj en Kumrano

La origino de la Esenoj perdiĝas en malproksimaj tempoj. Ili lasis spurojn en la antikva Egipto, kaj en aliaj landoj. En Kumrano vivis ĉirkaŭ 200 Esenoj de la dua jarcento a.K. ĝis la unua p.K. Pri ilia vivmaniero atestas ne nur la biblioteko en la dezerto, sed ankaŭ inter aliaj, la samtempaj historiisto Flavio Jozefo (*Flavius Josephus*), la natur-sciencisto Plinio la Maljuna (*Gaius Plinium*), kaj Aleksandria Filono (*Philon Alexandrino*). Plinio priskribis ilin kiel "raso en si mem, pli rimarkinda ol ĉiuj aliaj en tiu ĉi mondo". Laŭ Jozefo, ilian vivmanieron kaj principojn sekvis Pitagoristoj kaj Stoikistoj. Ĉiuj samtempaj aŭtoroj asertas ke ili ne estis sekto de metafizikaj spekulacintoj, sed ago-homoj, kiuj metis en praktikon siajn religiajn, moralajn, sociajn kaj sciencajn konceptojn. Ili asertas ke la Esenoj sin nutris per fruktoj, vegetaĵoj, semoj, kaj ne per viando. Ili ne faris oferadojn al diaĵo. Ili amis melodiajn muzikon, korpajn ekzercojn kaj dancojn.

Flavio Jozefo en la komunumo de la Esenoj

Flavio Jozefo vivis tri jarojn en la komunumo de la Esenoj en Kumrano, kaj li atestas en sia verko "Juda Milito" ke:
- ili helpas unu la alian, sed neniu el ili havas servistojn, ĉar ili kredas ke oni ne devas esti servisto al aliulo;
- ĉiuj kondutas laŭ la sama, simpla, laborema, sobra, vivmaniero;

- kompare kun aliaj homoj, ili estas pli moralaj;
- ili ne rifuzas edzecon; kelkaj el ili geedziĝas, ĉar ili konscias ke edzeco estas necesa por multobligi homaron; la plimulto el ili elektas ĉastecon;
- ili ne loĝas en urboj, tamen en urboj estas domoj, kie ili povas loĝi, kiam ili vojaĝas, kaj tie ili trovas tion, kion ili bezonas;
- ili uzas vestojn ĝis eluziĝo;
- riĉeco ilin ne interesas; neniu havas pli ol sufiĉa kvanto, kaj neniu estas en sufero pro manko de io;
- neniu aĉetas de la alia aŭ vendas aĵojn; oni donacas kaj ricevas de la alia tion, kion oni bezonas;
- la Pliaĝa elektas la laboron en kiu ĉiu estas lerta;
- antaŭ la leviĝo de la suno, ili ne parolas pri surteraj aferoj, kaj ili komencas la tagon per preĝo;
- ili komencas labori frumatene kaj post kvin horoj ili haltas; kune kun ĉiuj aliaj ili sin banas kaj poste ili surmetas linaĵan, blankan veston; tute puraj kaj en silento ili eniras en la manĝoĉambron kun la sama respektego kun kiu ili eniras templon; en silento kaj kviete ĉiu sidiĝas sur sia loko; la bakisto donas al ĉiu unu panon; la kuiristo metas teleron kun la manĝaĵo antaŭ ĉiu kunmanĝanto; tiam religiulo prezentas por la partopreno de ĉiuj komunan preĝon; neniu manĝas sen antaŭa preĝo; post manĝo la religiulo denove prezentas por la partopreno de ĉiuj komunan preĝon, kaj ĉiuj kantas laŭdan himnon; tiele ili dankas kaj antaŭ kaj post manĝo la Donanton de ĉiu bono; ili formetas poste sian blankan veston, kiun ili konsideras sanktan;
- ili reiras al laboro, kiu daŭras ĝis la suno subiras, kaj poste ili havas sobran vespermanĝon je la kutimaj ritoj;
- nek bruo nek disputoj malpacigas la domon; ili parolas laŭvice, mallaŭte, kaj tio ŝajnas stranga al tiu, kiu ne estas al tio kutiminta;
- "jes" kaj "ne" estas deviga kiel la plej sankta ĵuro; pro tio ili ne ĵuras, ekcepte je la ĵura enlaso, kiam ili estas akceptataj kiel efektivaj membroj en la komunumo; laŭ ili, homo kies vorto ne estas sufiĉa sen ĵuro, perdas estimon inter siaj civitanoj;
- studo de antikvaj tekstoj estas daŭra; ili lernas la resanigan arton, kiu plifortigas la korpon kaj la spiriton; ili estas spertuloj pri sanigaj herboj kaj plantoj por homoj kaj bestoj.

Glavo pli akra ol fero, la vorto de vero

Ĝenerale la Esenoj iĝas tre maljunaj kaj - pludiras Flavio Jozefo en sia verko - mi mem konas plurajn, kiuj atingis eksterordinaran maljunencon. Mi suposas ke tio dependas de ilia sobra, labora vivo kaj de severa reguleco. Ilia kuraĝo kaj neordinara trankvileco ne estas ĝenata de la plej gravaj katastrofoj, malfeliĉoj aŭ ĉagrenoj. Ili eltenas suferadon kaj dolorojn kun grandega kvieteco kaj mensa forto. Dum la Romia milito ili vere estis submetitaj al gravaj katastrofoj kaj suferoj. Ĉiuj formoj de suferado estis elpensitaj kaj uzitaj por neiigi ilian kredon, por moki ilian Leĝ-Donanton. Ĉiuj tiuj penoj estis vanaj. Neskueblaj je siaj decidoj, ili suferis tiujn ĉi turmentojn silente kaj per granda rezisto. Multaj el ili dum sia suferado riproĉis siajn malamikojn per glavo pli akra ol fero, per la vorto de vero.

Ili evitas malvirton

Ili kredas ke dum la monda vivo la spirito estas ĉenita al la korpo kiel kaptito en sia malliberejo, kaj kiam tiuj ĉi ĉenoj krevas pro eluziĝo kaj kadukiĝo, tiam la spirito estas liberigita je sia korpa malliberejo. Ili subtenas la doktrinon pri senmorteco de animo; ili akcelas kaj instigas virtan vivon kaj evitas malvirton.
Pluraj Esenoj estis profetoj. Iliaj antaŭsignoj preskaŭ ĉiam iĝis veraj, kaj tio pli grandigis la estimon, kiun ili ricevis kiel sanktuloj kaj profetoj.

Restaĵoj de la Esena vivejo en Kumurano ĉe la Morta Maro

Travivaĵo el Bulgario

KIEL KAPRIDO DIREKTIS NIN AL SENSANGA NUTRADO

Antaŭ kelkaj jaroj mia konato, kiu loĝis en proksima montvilaĝo, diris al mi ke pro la morto de sia patro, li devas likvidi la gregon de kaproj, kiu apartenis al lia patro, ĉar li ne plu povas bredi, kaj ke li deziras doni al mi freŝan viandon de buĉita kaprido. Mi estis okupita, kaj pro tio al li iris mia edzino. Ĉar mia konato ne estis certa pri mia alveno, la kaprido ne estis anticipe buĉita, kaj mia edzino devis atendi. Ŝi atendis sidante en korto inter la kapridoj, kiuj saltis, kuris, ludis ĉirkaŭturnis al mia edzino, kaj ĝi kun apenaŭ rimarkebla rideto, komencis leki ŝian manon kvazaŭ ĝi volus kisi ŝin. Reciproke mia edzino delikate ekkaresis la kaprideton kaj eksentis ĝin kiel ĝi estus ŝia infaneto. Unuafoje en sia tuta vivo ŝi renkontis tiel ĉarman besteton, kaj spertis tiun aman senton.

Tiumomente la buĉisto turnis al Ivanka, mia edzino. - Tiu ĉi kaprido aprobas ke vi preferas ĝin, ĝi eĉ ekamikiĝis kun vi, kaj pro tio mi buĉos ĝin por vi -. Antaŭ ol mia edzino povis diri vorton, la buĉisto kaptis la kaprideton. Mia edzino ektremis. Tuj ŝi turnis sin alidirekten. Ŝi aŭdis nur korŝirantan kapridan voĉon, kiu ŝajnis al ŝi deziris diri - Onklino Ivanka, kial dum vi karesas kaj ĝojigas min, samtempe vi permesas mian buĉadon? Ĉu tio estas la signifo de homa hipokritado? Ĉu vi, tiel agrabla, milda, amema virino, verŝajne patrino, estas kapabla voli mian morton? Ĉu vi manĝos mian korpon, kiun vi karesis per via mano nur antaŭ kelkaj momentoj? -
Ivanka plu nek rigardis la buĉiston, nek interparolis kun li. Kiam li diris - Ĉio estas preta -, ŝi larmante pagis, prenis la sakon kun la kaprideta korpo kaj foriris. Dum aŭtobusa veturado ŝi senĉese ploradis pro la kaprideto kaj pro sia peko antaŭ la Kreinto de ĉiuj estaĵoj. Revenante hejmen, ŝi estis malĝoja kaj silenta. Kiam ŝi atingis la sojlon de la domo, ŝi deklaris: - Ivan, mi ne manĝos eĉ peceton de tiu ĉi kaprideto. Neniam mi forgesos tiun malgrandan, belegan, mildan, sendefendan estulon naskitan por vivi, ne por esti buĉata kaj manĝata de homoj. Ĉu ni homoj ne estas la plej saĝaj surteraj estu-

loj? Kaj kiu donas al ni la rajton agi tiamaniere? La Tero estas plenplena je manĝaĵoj -. Dirite, farite. Mia edzino ne kuiris la kapridetviandon. Ĝin ni donacis al nia parenco, sen klarigi la motivon.

Paŝon post paŝo, iompostiome, nia familio malkutimiĝis manĝi viandon, kaj estas vere, kiel oni diras, ke la plej multo de la tabloj restus sen viando, se la mastrino de la domo devus mem mortigi la beston.

Ivan Trifonov Minĉev

bongustaĵoj

el la kuirejo
de Norina Barelli

Kikero-Kaĉo (v)*

por 4 personoj

250 g	da sekaj kikeroj	petroselo
1	citrono	olivoleo
3	ajleroj	salo

Elektu sekajn molajn kikerojn je lastatempa rikolto. Bone lavu ili kaj lasu ili trempi en malvarma akvo 24 horojn. Kribru. Ĵetu ilin en bolantan akvon kaj boligu ilin 10 minutojn, kaj poste senhaŭtigu ilin. Daŭrigu boladon de senhaŭtigitaj kikeroj je alta fajro dum la unuaj 5 minutoj, kaj je malalta fajro ĝis ili estas molaj. Aldonu salon. Preparu saŭcon: haketu ajlon kaj manplenon da petroselo, kaj miksu kun citronsuko, salo kaj oleo. Kiam kikeroj estas pretaj, premu ilin per ligna kulero ĝis vi ricevas kaĉon. Bone miksu saŭcon kun kaĉo. Sur la centron metu kelkan folion de petroselo, kaj ĉirkaŭen duontranĉaĵojn de citrono.

Sojfabaĵo (v)*

por 4 personoj

4	plenmanoj da soijfabaĵo	vegetaĵa buljono
	(aùĉetebla sekisita kubetforme)	oleo
2	cepoj	kapsiketo pulvorigita
4	terpomoj	salo
	tomatkaĉo	

Fritetu en oleo cepojn trancitaj maldike, ĝis ili estas tute velkaj. Aparte bolkuiru sojfabaĵon en vegetaĵa buljono; kribru ĝin; subrostu ĝin kun abunda tomatkaĉo kaj salu. Tranĉu ere terpomojn kaj aldonu ilin al la tuto; kovru ilin per vegetaĵa buljono, kaj kompletigu kuiron. Je la lasta momento aldonu iomete da kapsiketo.

Melongenoj laŭ marista gusto (v)*

por 4 personoj

4 melongenoj
2 ajleroj
ruĝa kapsiketo
1 tekulero da origano

pinĉaĵo da timiano
oleo
vinagro
salo

Senpintigu melongenojn, lavu ilin, kaj vaporkuiru ilin 10 minutojn. Tranĉu ilin laŭ la longo kaj metu ilin en fajencan aŭ vitran ujon. En profunda telero kirlu 2 aŭ 3 supkulerojn da vinagro kun iomete de salo; aldonu ajlerojn tranĉitaj aŭ fadenitaj, kaj haketitan patreoselon, timianon, kapsiketon, origanon, kaj oleon. Bone miksu per forketo kaj surverŝu la saŭcon sur la melongenojn. Lasu ke ili trempiĝu dum la tuta tago, antaŭ surtabligi ilin.

Brokoloj kun pastaĵo (v)*

brokoloj
ia ajn pastaĵo

olivoleo

Elektu freŝajn, bele verdkolorajn brokolojn kun fermitaj floroj, firmaj tigoj kaj molaj folioj. Lavu brokolojn. Fortranĉu grandajn foliojn. En saman poton, metu samtempe, kiam akvo bolas, kaj brokolojn kaj pastaĵon. Kiam la tuto estas kuirita (ĉ. 20 min.), forverŝu akvon, kaj metu brokolojn kun pastaĵo en taŭgan pladon, aldonu oleon kaj miksu. Se vi ŝatas la guston, uzu oleon, en kiu vi lasis trempi kapsiketon kaj ajlon.

Artiŝoka haketaĵo (v)*

artiŝokoj
petroselo
rostpantranĉoj

olivoleo
citronoj
salo

El freŝaj, junaj kaj molaj artiŝokoj eltranĉu parton kiu estas mangebla kaj tuj, por eviti oksidiĝon, trempu ili dum kelkaj minutoj en akvo kun citrono. Haketu ilin tre maldike, kaj aldonu haketitan petroselon, oleon, salon kaj raspitan panon. Miksu per ligna kulero. Per tiu ĉi bongusta kaj bonodora haketaĵo ŝmiru rostpantranĉojn.

Terpomoj laŭ la kamparano (v)*

por 4 personoj

6	terpomoj	petroselo
1	malgranda tomato	ruĝa kapsiketo
1	ajlero	oleo
	plenmano da sekigitaj fungoj	

Lasu trempi en varmeta akvo plenmanon da sekigitaj fungoj 20 minutojn. Vaporkuiru terpomojn. Laus terpomojn malvarmiĝi; senŝeligu ilin kaj tranĉu ilin ronde. En kaserolon metu 2 supkulerojn da oleo kaj fritetu en ĝi tranĉitan ajlon. Aldonu terpomojn, fungojn, pecetigitan tomaton, iomete da kapsiketo, salon kaj hakitan petroselon. Miksu.

Rizo laŭ orienta gusto (v)*

por 4 personoj

350 g	da rizo	50 g	da vegetaĵa margarino
50 g	da migdaloj		ruĝa kapsiketo
1	poreo		salo
2	ripoj de celerio		

Boligu rizon en salita akvo. Kribru ĝin kaj metu ĝin en bovlon. Lavu bone kaj distraĉu poreon kaj ripojn de celerio. Metu poreon kaj celerion kun margarino en apartan kaserolon, kaj kuiru la tuton ĝis konsumiĝo. Aldonu muelitajn migdalojn, kaj miksu dum kelkaj minutoj. Almetu rizon, iomete da kapsiketo, salon, kaj tuj servu.

Kolora rizbakaĵo (l/o/v)**

por 4 personoj

300 g	da senbranigita rizo	2	supkuleroj da kaporeroj
4	flavaj kapsikoj		kapsiketo ruĝa
4	maturaj tomatoj malgrandaj	4	folioj de freŝa bazilio
2	"mocareloj" (freŝa fromaĝo)		origano
2	cepoj		Parma fromaĝo
1	ajlero		olivoleo
100 g	da nigraj olivoj		

Kuiru rizon. Sensemigu kaj sentigetigu kapsikojn, kaj tranĉu ilin je grandaj pecoj. Tranĉu maldike ajlon kaj cepojn. Metu poton sur fajron kun 2 supkuleroj da oleo, cepo, ajlo kaj post kelka minuto aldonu kapsikojn. Miksu dum kelka minuto je gajeta fajro; malaltu fajron, kovru per kovrilo kaj stufu 10 minutojn. Aldonu senŝeligitajn tomatojn premitaj per forketo, kaj daŭrigu la kuiradon 10 minutojn. Lavu bone la kaporerojn kaj aldonu ilin kun senkernigitaj olivoj, salo kaj kapsiketo. Aparte lasu por garnado kelkan tranĉaĵon de kapsiko, mocarelan fromaĝon, olivojn kaj 2 foliojn de bazilio. En fornotaŭgan ujon metu tavolon da rizo, kovru ĝin per tranĉaĵoj de mocarela fromaĝo, kapsikoj, bazilio pecigita kaj per la preparitaj ingrediencoj. Daŭrigu alternante rizon kun ingrediencoj kaj finante per rizo sur kiun vi metos raspitan Parman fromaĝon. Kolore garnu la tuton per flavaj pecetoj de kapsiko sur blankaj traĉaĵoj de mocarela fromaĝo, nigraj olivoj kaj centre folioj de bazilio. Metu en varman fornon dum 15 minutoj je mezalta varmeco.

Jen tipa plado tre populara en Triesto (Trieste), Italio, kiu en la loka dialekto oni nomas "ñoki de suzini". En E-o ne ekzistas la sono "ñ", kiu estas elparolata kiel en la Hispanaj vortoj "España" aŭ "niño". "Ñoki" havas formon de buletoj, kaj "suzini" signifas prunojn.

"Ñoki de suzini" (l/o/v)**

1 kg	da terpomoj farunaj	1	supkulero da olivoleo
500 g	da freŝaj prunoj		vegetaĵa margarino
250 g	da faruno		raspita pano
1	ovo		cinamo

Bolkuiru terpomojn. Per terpompremilo premu ilin. Kiam ili estas ankoraŭ varmaj, almetu ovon, oleon, salon kaj tiom da faruno, kiom necesas por ĝuste densa pasto. Knedu. Faru platajn disketojn (5 centimetrojn en diametro), kaj en la centro de ĉiu disketo metu 1 senkernikitan prunon, kiu estos volvita kaj fermita per pasto buletforme. Ĵetu ilin iom post iom en abundan bolantan akvon. Tuj forprenu tiujn, kiuj ekflosas surakve. Aranĝu ilin sur plado, kaj surmetu sur la tutan surfacon de la buletoj varman margarinon orkolorigita en la sama pato kun 1 plenmano da raspita pano kaj iomete da cinamo.

el la kuirejo
de Filomena Canzano

Frititaj artiŝokoj (v)*

Lavu artiŝokojn kaj fortranĉu malmolajn foliajn partojn. Tranĉu ilin kvarone. Aldonu salon, olivoleon kaj citronsukon. Preparu molan paston kun akvo kaj faruno. Metu tranĉitajn artiŝojn en paston, turnu ilin, kaj fritu.

Melongenaj ŝipetoj (l/o/v)**

Necesas melongenoj longaj kaj malgrandaj. Tranĉu ilin duone laŭ longo (se ili estas tro longaj tranĉu ilin ankaŭ verticale). Forprenu pulpon el melongenoj sen tuŝi ŝelon kaj metu ĝin en ujon, tegu ĝin kun tomata saŭco (kuirita aŭ ne kuirita) kun olivoleo kaj salo. Baku. Kiam ili estas kuiritaj, surmetu pecon da fromaĝo "mocarela" aŭ alian freŝan fromaĝon. Baku ankoraŭ iomete.

---

* v : vegetaĵa nutraĵo
** l/o/v : lakto-ovo kaj vegetaĵ-nutraĵo

... kio estas la homo sen bestoj?
Se la bestoj malaperus, la homo mortus
pro granda soleco de la spirito.
Kio okazas al la bestoj,
tio baldaŭ okazos al la homo.
Ĉiuj aĵoj rilatas inter si.
Instruu al viaj infanoj,
kion ni ĉiam instruis al la niaj:
la Tero estas nia Patrino.
Ĉio, kio okazas al la Tero,
tio okazos al la idoj de la homo;
la homo apartenas al la Tero.
La bonodoraj floroj estas niaj fratinoj;
la cervo, ĉevalo, granda aglo estas niaj fratoj.
La rokaj krestoj, la varmo de la poneo,
kaj la homo:
ĉiuj apartenas al la sama familio:
ĉiuj devenas de la sama spiro...

Ĉefo Seattle, *el la Amerika*
ruĝhaŭta tribo Duwamish

Moroj en perspektivo

LA REVOLUCIO DE LA PARDONO

EN LA NUNTEMPA SOCIO

"Estas tiom da beleco en tio, kio naskiĝas, en tio, kio komenciĝas", skribas *Rainer Maria Rilke* al juna poeto. Kaj *Hannah Arendt* en sia verko "*Vita Activa*" (Aktiva Vivo) asertas ke se ĉiuj homoj devas morti, ili ne naskiĝis por morti, sed por komenci. *Hannah Arendt* (*Hannover* 1906 - *New York* 1975) studis filozofion, teologion, filologion, kaj en sia esploro ŝi alfrontas la temon pri pardono, kaj profundigas la liberan, revolucian rolon, kiu ĉirkaŭvolvas en si la individuon kaj la socion.

La apero de la libereco

Hannah Arendt volas kapti la korbatantan travivaĵon de la homa agado je ĝia mema radiko, en ĝia naskiĝa stato, en ĝia origina dinamismo, t.e. en la momento kiam ĝi ekaperas, efektiviĝas kaj triumfas super ĉiuj kontrastaj fortoj en la mondo. Malsame je la venĝo, kiu estas la natura, aŭtomata reago al transpaŝo kaj al ofendo, kaj povas esti antaŭvidita kaj ankaŭ prikalkulita, la ago de pardono ne povas esti prikalkulita: ĝi estas malfermo, kutim-interrompo, neatendita reago; ĝi havas en si mem - kvankam ĝi estas reago - originan agad-karakteron; ĝi estas nova, freŝa, krea ago, kiu ne nur reagas, sed subite ekagas; ĝi estas tio, kio liberigas la homon de la venĝoĉeno de la nerepacigebla aŭtomatismo: kaj tio estas libereco.

La homo estas libereco

Kiel novnaskita en tiu ĉi mondo, la homido estas komenco, kiu poste povos preni iniciaton: tiusence li mem estas libereco; libereco estas la karakterizo de lia ekzistado, kiu evidentiĝas nur per lia agado.
Historiaj kaj individuaj procedoj estas daŭre kreataj kaj ĉesigataj per la agado de la homo, kiu per sia iniciato modifas, rompas situaciojn, kaj donas alian vojon al la eventoj.

Ĉu la homo havas agad-liberecon en la aktuala socio?

Nuntempaj demokratioj donas povon al la popoloj, kaj ofte samtempe ili detruas la rimedojn per kiuj la popolo povas agi civitane kaj la socio iĝas kampo, kie oni oportunisme kultivas malamon kontraŭ novaj kaj malnovaj malamikoj, kaj kie la kulpoj de la pa-

troj, veraj aŭ supozataj, pendas kiel glavo de Damoklo super la kapo de ĉiu nova generacio.
La principo de la pardono ne trovas lokon en la fundamento de la jura ordigo. Tamen la organizado de la socia bonstato ne povas sin abstrakti de la socia konkordo kaj de la etika ordigo, se ĝi volas eviti institucian malordon kaj sociajn kontestadojn. Se oni metas la socian bonstaton je la ekskluziva dependo de ekonomia interpretado de la Historio, senigante la homon - kiu determinas la ekvilibron en ĝi -, de aliaj valoroj t.e. vero, devo, honesteco en rilato al la aliulo kaj respekto al li, oni degenerigas la publikan bonstaton kaj portas la homon al mensa malorganizado, al morala degeneriĝo, al socia izoleco, kaj al kompleta malestimo de la estaĵo.

Valoro de la laboro

En la aktuala ekonomia sistemo la etika disciplino perdas valoron; la libereco de la homo koncernas nur la produktadon de konsumvaroj, kiu senigas la laboron de iu ajn merito. La laboro celas nur la pagon; ĝi estas senigita de sia vera digno, de sia krea rolo. Utilo sin ligas al sklaveco, ĝi deprenas valoron de la vivado, kaj ĉiun sencon de libereco.

"Panem et circenses"

La homo estas sklava de malvera libereco, kiu instigas lin nur al plezuro, arbitro kaj konsumado. Kiel en la antikvaj tempoj de la dekadenca Roma imperio, la popolo restadis trankvile indiferenta antaŭ tiuj malvirtaj moroj, kondiĉe ke ili havos panon kaj ludojn ("*panem et circenses*"), same estas la dekadenco de la aktualaj institucioj.

Socio ne estas mortinta naturo

Renoviĝo, kiu alkonduku al unuiĝanta ponto inter etiko, socio kaj ekonomio ŝajnas neebla. Tamen socio ne estas mortinta naturo. La homaj rilatoj estas ĉiam en konstanta, evolua procedo kaj metamorfozo. Kiam la historia kaj socia sceno montras procedojn katastrofajn kaj neinversigeblajn, tiam oni devas esperi en tiu agado plenumita en libereco, en la evento de renoviĝo, kaj eĉ en la revolucia ago de la pardono. Inter estinteco kaj estonteco estas komenco kaj sekva ebleco ke la homo povas renoviĝi. Ricevinte la duoblan donacon de vera libereco kaj de ago, la homo povas pardoni, ĉesigi, devojigi procedon, kaj tiele fondi sian novan, propran realaĵon.

ĈU VI HAVAS DUBON?

Ni deziras ĉi tie respondi al la demandoj pri lingvaj duboj, kiujn niaj legantoj petis al ni klarigi:

1. Ĉu "estas eble" aŭ "eblas"?

Ĉu estas eble verbigi la vorton "eble"? La vorto "eble" montras estadon, ne agadon, kaj verbigi ĝin, povus malfermi la vojon al verbigado de ĉiuj aliaj estadaj vortoj. "Estas eble" estas klasika kaj pli belsona, laŭ nia opinio, kvankam la verbo "ebli" estas ofte uzata.

2. Esperanto kun la komenca litero minuskla kaj majuskla

La radiko "esper-" larĝsence signifas "atendi kun fido la realiĝon de tio, kiun oni deziras" (PIV), kaj ĝin kun ĝiaj derivaĵoj oni skribas minuskle, ekzemple:
espereble, esperata, esperdona, esperplena, mal-esperanto, stato kaj sento de esperanto, ŝi esperigas min pri ŝia alveno.
"D-ro Esperanto" estis origine la kaŝnomo de d-ro Lejzer Zamenhof.
Tiusence Esperanto estas persona nomo, kaj ĝi konservas la majusklan ankaŭ por siaj derivaĵoj, ekzemple:
la lingvo de d-ro Esperanto, Esperantujo, la himno do la Esperantistoj; ĉar mi esperas, mi estas esperanto; ĉar mi lernas la lingvon Esperanto, mi estas Esperantisto.
Por eviti dubojn kaj konfuzojn, oni sekvu tiun ĉi uzadon, ĝis la uzo mem sankcios definitivan regulon.
En ĉiuj aliaj lingvoj, la vorto Esperanto devas esti skribita kiel la aliaj lingvoj, ĉar Esperanto fakte estas unu inter la aliaj lingvoj, kiuj estas normale kaj oficiale akceptataj kaj uzataj en la mondo.

3. Danke al, kaj dank'al

Zamenhof mem uzis la dirmanieron "dank'al", sed ankaŭ "danke" sen "al" kaj kun la akuzativo (danke la gramatikon). "Dank'al" signifas "danko estu al". Laŭ la 16-a Regulo, la finaĵo de la substantivo -o, kaj de la artikolo -a povas esti forlasataj kaj anstataŭataj per apostrofo. Se "danko" estas substantivo, oni povas forlasi la finaĵon -o (dank'al al Dio, ĉio estas en ordo). Se al la senco de la frazo ne konvenas la substantivo sed adverbo, la "e" de "danke" ne estas apostrofebla (danke al la gramatiko).

4. Pro kaj por

mi dankas vin pro via letero
(mi jam ricevis la leteron, kaj pro tio mi dankas vin)

PRO indikas kaŭzon pro kio io estas, okazas, aŭ pro kio oni agas:

mi gratulas vin pro via sukceso (Z)
pro stranga koincido de cirkostancoj
vi ne havas kaŭzon pro koleri (Z)
mi ĝin faras ne pro malvera modesteco (Z)
mi ridas pro lia naiveco (Z)
mi venis pro serioza afero (Z)
ŝviti pro varmego

SED

se oni celas atingi aŭ plenumi ion, kaj al tio oni direktas sian agadon, deziron aŭ volon, oni uzas POR:

mi antaŭdankas vin por via atento
(mi skribis leteron al vi, kiu celas ricevi informojn, kaj mi atendas nun respondon, kaj por via atento al tiu ĉi celo mi antaŭdankas vin)

labori por Esperanto (Z)
por kia celo? (Z)
por kio vi venis al mi? (Z)
por ekzemplo
por via informo
ĉu vi opinias min kapabla por tiu ago? (Z)
la por kaj la kontraŭ

5. Posedaj Vortoj

La posedaj adjektivoj kaj pronomoj montras la posedanton, tiun, kiu posedas. La prepozicio - de - antaŭ la posedanto montras la posedon. La posesivo povas akompani la subjekton:

Marko havas katon
la katon de Marco (de li) = lia kato

mia manĝo (de mi)
lia manĝo (de li)
ŝia manĝo (de ŝi)
ĝia manĝo (de la hundo)
nia manĝo (de ni)
via manĝo (de vi)
ilia manĝo (de ili, viroj, virinoj aŭ hundoj)

ĉu vi notis ŝian veston?
ĉu vi notis lian ĉapon?
ĉu vi notis ĝian voston?

Posedaj pronomoj

La poseda pronomo anstataŭas la substantivon, montras la posedanton, kaj kutime estas antaŭata de la artikolo -la-:

tiu manĝo estas la mia (de mi)
tiu manĝo estas la via (de vi)
tiu manĝo estas la ŝia (de ŝi)
tiu manĝo estas la lia (de li)
tiu manĝo estas la ilia (de ili)

6. Si- refleksivo

La refleksivo adjektiva kaj pronoma si- rilatas al la subjekto, kiu agas en la reganta frazo. La refleksivo neniam estas subjekto.
Si- estas uzata nur ĉe la 3-a persono.

Adjektiva refleksivo

La adjektiva refleksivo akordiĝas laŭ la nombro, kaj kazo kun la refleksivaĵo:

homo manĝas sian panon
virino zorgas pri siaj infanoj
hundo trinkas sian akvon
li komencas sian laboron
Antono estas la plej saĝa el ĉiuj siaj fratoj

Pronoma refleksivo

La pronoma refleksivo ricevas la finaĵon de la koncerna kazo kaj estas uzata ĉiam ĉe la 3-a persono:

ŝi lavas sin
li amas sin mem
ili vestas sin rapide

Se en la frazo, la subjektoj estas pli ol unu, la dua subjekto ne povas ricevi refleksivon, ĉar la refleksivo neniam estas subjekto. La dua subjekto respondas al la demando - de kiu? -, kaj al tiu la refleksivo, rilatos:

- **Alberto kaj la fratino** (la fratino de kiu? De li, de Alberto) **amas miajn infanojn**
  Alberto kaj lia fratino amas miajn infanojn
- **Marta kaj la frato** (la frato de kiu? De ŝi, de Marta) **amas miajn infanojn**
  Marta kaj ŝia frato amas miajn infanojn

Sed atentu:

- El kies poŝo li prenis la monon?

- **li prenis la monon el sia poŝo** (rilatas al la subjekto; refleksivo)
- **li prenis la monon el lia poŝo** (de li, de alia homo; posesivo)

- Kies aŭton Petro montras al Luko?

- **Petro montras al Luko sian aŭton** (rilatas al la subjekto, al Petro; refleksivo)
- **Petro montras al Luko lian aŭton** (de li, de Luko; posesivo)

Se en la periodo estas pli ol unu frazo, ankaŭ la subjektoj estos pli ol unu, kaj ne forgesu: la refleksivo neniam estas subjekto:

Subjekto			**Subjekto**
li	**rigardas kiel**	**lia kato**	**lavas sin**
ŝi	**rigardas kiel**	**ŝia kato**	**lavas sin**
la sinjoro	**ordonas al**	**la servisto**	**vesti sin** (vesti sin mem)
la sinjoro	**ordonas al**	**la servisto**	**vesti lin** (vesti la sinjoron)

7. Ne bezonataj neologismoj

Ni ne deziras paroli ĉi tie pri la lingvaj postuloj de poetoj, kaj ni ne kontraŭas ĉiujn neologismojn, kiuj estas necesaj por la evoluo de la lingvo. Ni deziras paroli pri neologismoj, kiuj ne estas bezonataj en la rapida, konciza, rekta, ĉiutaga vivo de nia lingvo, kiam jam ekzistas taŭgaj vortoj, kiuj klarigas la ideojn per aldonaĵoj (kiel ekzemple "mal-"), kiujn ni ĉiuj jam bone konas. Jen kelkaj ekzemploj:

Neologismoj	**Vortoj kun afiksoj kaj kunmetaĵoj**
ascendi	**supreniri**
basa	**malalta**
bunta	**diverskolora**
descendi	**malsupreniri**
dura	**malmola**
febla	**malforta**
frida	**malvarma**
kirko	**preĝejo**
kurta	**mallonga**
lanta	**malrapida**
magra	**malgrasa**
noci	**malutili**
obskura	**malluma**

Sekvas

(Neologismoj)	(Vortoj kun afiksoj kaj kunmetaĵoj)
olda	**maljuna**
pigra	**mallaborema**
plumpa	**malgracia**
povra	**kompatinda; malriĉa**
softa	**mallaŭta**
streta	**mallarĝa**
tarda	**malfrua**
trista	**malĝoja**
turpa	**malbela**

8. Predikato, atribuado kaj predikativo atribua

Predikato

La predikato indikas ies agon aŭ staton:

la pomo	**estas** predikato	**bongusta**

Atribuado

Se oni ne konstatas fakton, sed atribuas al ĝi propran aŭ de iu alia opinion, tiu ĉi formo gramatike estas nomata atribuado:

mi trovas la pomon	**bongusta** atribuado

En la ĉisupra ekzemplo du apartaj propozicioj formiĝas, kiuj sin sintezas en unu solan:

unua propozicio: **mi trovas la pomon**
dua propozicio : (ke la pomo estas) **bongusta**

Predikativo atribua

La predikativo atribuas la kvaliton de la subjekto kaj de la objekta komplemento:

I. **La pomo**
subjekto de la asertonta fakto
II. **estas**
predikato, kiu indikas fakton
III. **bongusta**
atribuo

a) **Mi**
subjekto

b) **trovas**
predikato

c) **la pomon**
objekta komplemento, kiu estos samptempe subjekto de la sekva predikativo, kiu pro tio estos en nominativo

(ke la pomo)
subjekto de la sekva predikativo

ĉ) (estas)
predikato forlasita

d) **bongusta**
predikativo atribua

- **ŝi kolorigis la veston ruĝa**
- **ĉu vi sentas vin sana?** (Z)
- **mi sentis min ia fremdulo** (Z)
- **la publiko kutimas opinii ĉiun atakanton bravulo, kaj ĉiun atakaton kulpulo** (Z)
- **mi atestas tion vera**
- **ĉion Dio kreis bela siatempe** (Z)
- **la naturo metis nin nudaj sur la bordon de tiu ĉi granda mondo**
- **ne nomu min reĝido, sed amiko** (Z)
- **oni elektis lin** (por ke li estu) **prezidanto**
- **kia oni vin vidas, tia oni vin taksas** (Z)

9. Ne forgesu akuzativon

- ni deziras al vi bonan tagon!

- la 15-an de Decembro naskiĝis Lejzer Zamenhof
- la alvenon de printempo ni festos la 21-an de Marto
- mi iros al mia onklo lundon
- la venontan semajnon li venos al mi
- mi atendis lin tri horojn
- mia filo estas dudek jarojn aĝa
- mi havas kvardek jarojn
- mi promenis la tutan tagon (Z)
- li estis oficisto tridek jarojn

- ŝi estis unu paŝon de la krutaĵo
- du paŝojn distanca de mi
- ĝi kostas okdek frankojn
- ĝi estas unu kilogramon peza
- la pentraĵo estas miliardon valora
- la domo estas kvar metrojn larĝa

